



**LERNANTINOJ**  
**INSTRUISTINOJ**



# ESPERANTO

## revuo internacia

### enhavo

- 137** La taskoj de la fakaj organizaĵoj (Red.)  
La Internacia Semajno de Leterskribado (JT)
- 138** Novaj membroj de la Honora Patrona Komitato  
Novaj estraranoj de UEA
- 139** Lernantinoj fariĝis instruistinoj
- 140** Recenzoj
- 142** Ricevitaj eldonaĵoj  
Citaĵoj
- 143** Mallonge
- 144** 53-a Universala Kongreso, Madrid, 1968  
La K.K.S. edziĝis  
Postkongresaj aranĝoj 1967  
Pri fakaj reprezentantoj (letero)
- 145** Esperanto en radio  
Nekrologoj Neergaard, Mudrak, Markarian  
Memore al la murditaj familianoj de Zamenhof
- 146** La Juna Vivo
- 147** Heredaĵo A. M. Hyde  
Nova Servo de UEA  
Belartaj Konkursoj 1968  
Oficiala informilo n-ro 405
- 148** Anoncetoj  
Internaciaj Konkursoj 1967

### kovrila bildo

Christel Aderjan instruas la verbotempojn  
(foto: Erasmus Zilles) — vidu p. 139.

### bildojn liveris

- 139** N. van der Horst
- 143** Galobart

## oficiala organo de universala esperanto-asocio

(en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)

esperanto  
oktobro 1967

Fondita en 1904 de H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

**Ĉion pri administrado de UEA** kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef.: (010) 23 27 88 Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

**Ĉiu materialo por difinita numero** devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ** la 1-a de la antaŭa monato.

**Manuskriptoj** por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

**Bankisto de U.E.A.:**

Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

**Presisto:** Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

**Traduko kaj represo** de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

**Jara abono (1967):** 18,75 gld. (kun membreco kaj jarlibro 25,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj. Unuopa numero: 1,— gld.

**Tarifo por reklamoj:** ricevebla laŭ peto.

**Anoncetoj:** 0,45 gld. aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Teksto de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

**Legantoj en ĉ. 80 landoj**

**Estraro de U.E.A.:**

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj kaj kulturaj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Mddx, Britujo.  
S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto kaj estrarano pri administrado, Postbus 412, Eindhoven, Ned.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, D-6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 de Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk 1, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

D-ro Peter Zlatnar, estrarano pri kongresoj, Rimska 7/II, Ljubljana, Jugoslavio.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro Ulrich Lins, D-5 Köln-Dellbrück, Germarkenstr. 146, Germanujo.

**Centro de Esploro kaj Dokumentado**

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: (01) 904 9081.

**Serva Centro:** ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, 8057 Zürich, Svislando.

Du sekcioj de la 52-a UK diskutis fakajn aplikojn de Esperanto: Sekcio I ĝeneralajn, Sekcio III la turismajn. Relegante nun, unu monaton poste, la tiamajn diskutojn, oni povas distingi du gravajn problemojn: tiun de la ekvilibra plenumado de laborplanoj kaj tiun de la eksteraj fakaj kontaktoj.

La Dua Baza Laborplano de UEA (1956) mem difinis: "Ĉiuj eroj de la programo estas same gravaj kaj dependas unu de la alia". Nepre! Unu ekzemplo: La eron 5(f), "duobligi la nombron de fakaj delegitoj" ni preskaŭ jam plenumis. En 1967 estas 1774 FD kontraŭ 914 en 1956. Sed la sama Laborplano postulis "konsiderinde altigi la nombron de individuaj membroj". Kresko de 6204 en 1956 al 7514 en 1967 ne estas "konsiderinda altigo". Sekve la elspezoj (administrado de FD, presigo en la Jarlibro) multe kreskis, sed la enspezoj (individuaj kotizoj) preskaŭ ne. Konsekvence necesis redukti en 1967 la paĝojn dediĉitajn al fakaj kaj neneŭtralaj organizaĵoj. Mallonge: necesas raciigi kaj ampleksigi la fak-delegitan reton, jes — sed samtempe la fakaj organizaĵoj aliĝu kolektive al UEA (ankoraŭ nur tri tion faris!) kaj instigu siajn membrojn individue aliĝi. La sama principo validas por ĉiuj eroj de la Laborplano. Senutile ellabori fakajn terminarojn, se oni ne verkas fake en Esperanto; aliflanke faka verkado iĝas ĥaosa, se

mankas terminologia unueco. Ĉio devas progresi samtempe kaj paralele!

La dua problemo estas tiu de la eksteraj kontaktoj. Ni prenu la ekzemplon de turismo. La plimulto de turismaj oficejoj en la mondo ankoraŭ ne korespondas Esperante. Estas do pli facile ricevi informojn per la delegita reto de UEA. Tio bone funkcias, tamen kun la malbona sekvo, ke la turismaj instancoj povas sin pravigi per tio, ke ili neniam ricevas informpetojn en Esperanto! Ju pli bone laboras la delegitoj, des malpli la urbaj instancoj bezonas korespondi en Esperanto. Simile en aliaj fakoj: ju pli efike laboras (interne) la fakaj Esperanto-organizaĵoj, des malpli oni sentas la bezonon membriĝi (kaj influi) en ne-Esperantaj organizaĵoj. Ĝis nun diversaj organizaĵoj trovis diversajn unuopajn solvojn por tiu dilemo. Sed fakte ĉiuj estus aplikeblaj sur ĉiuj kampoj. Ĉiuj (ne nur la juristoj) povus kunveni dum la UK kun ne-esperantistaj fakuloj. Ĉiuj povus direkti rezolucion al la samfaka ekstera instanco (kiel la 3a Sekcio al la turisma organizaĵo UIOOT). Ĉiuj povus per iom da organizo akceptigi Esperanton kiel kongresan lingvon, kiel faris la staciestroj, aŭ kiel lingvo de resumoj en fakaj organoj, kiel atingis la medicinistoj. Kaj en UEA ili povas trovi interfakan forumon por la interŝanĝo de tiaj spertoj. Ili utiligu ĝin!

## LA INTERNACIA SEMAJNO DE LETERSKRIBADO

La 9-an de oktobro 1874, en Bern (Svislando) estis fondita la Universala Poŝta Unio (UPU), kies centra oficejo ĝis hodiaŭ troviĝas en tiu urbo. Al la Unio apartenas hodiaŭ pli ol 100 ŝtatoj, kaj ĝi enviciĝis al la fakorganizaĵoj de UN.

Antaŭ dek jaroj, dum la Tutmonda Kongreso de Poŝtoj en Ottawa (Kanado) en 1957, oni decidis ĉiujare festi la memoron pri tiu gravega eltrovaĵo de homa kulturo, kiun prezentas la simpla fakto, ke laŭvorte ĉiu homo troviĝanta kie ajn en la mondo povas sendi leteron al ĉiu loko de la terglobo, kie nur ekzistas ia poŝtofoicejo, kaj ricevi respondon. Kvankam la eltrovaĵo estas preskaŭ tiel malnova kiel la kulturo mem, tamen nur dank' al la Unio ĝi universaligis. Fine oni decidis, ke ĉiujare, en la unua tagdeko de oktobro, en ĉiu lando apartenanta al la Unio oni festu la Internacian Semajnon de Leterskribado. Laŭ tiu decido la poŝtaj landaj administracioj devas dum tiu semajno popularigi la signifon de la servoj liverataj de la poŝto kaj la rolon de la letero, kiu estas gravega rimedo por reciproka interkompreniĝo, por plifortigo de la amikeco kaj por kreado de diversspecaj ligoj inter homoj de

malsamaj nacioj. Kaj tiuj ligoj certe estigas kondiĉojn por vere paca sento inter la popoloj.

Oni ne bezonas ĉi tie substreki la signifon de la poŝto kaj de leterskribado por la Esperanto-movado. Niaj organizaĵoj bezonas ĉiam diversflankajn servojn de la poŝto, kaj tutcerte la precizeco en la plenumado de iliaj funkcioj grandskale dependas de bone funkciantaj poŝtaj servoj. Ĉiu Esperanto-instruisto bone ja scias, ke la unuaj paŝoj de la komencantoj estas korespondado kun eksterlando. Ankaŭ dum tiu ĉi jaro en multaj landoj oni festas la Internacian Semajnon de Leterskribado. Estus bone, ke ĉiu instruisto instigu junajn gekorespondantojn, ke ili dum la semajno aŭ skribu al siaj amikoj salutojn, aŭ komencu novan korespondadon, aŭ kontrolu, ĉu ili eble ne respondis al iu korespondanto, kiu malpacience atendas — kaj ke ili faru tion tuj.

Oni devas uzi la okazon ankaŭ por klarigi al neesperantistoj, ke internacia korespondado bezonas vere internacian lingvon: Esperanto. Oni povas aranĝi en tiu semajno ekspoziciojn de leteroj en Esperanto senditaj el diversaj mond-partoj, kaj informi pri la lingvo. Kaj tio estos certe la plej bona maniero por festi la Internacian Semajnon de Leterskribado. J.T.



# NOVAJ MEMBROJ DE LA HONORA PATRONA KOMITATO



## Ralph Harry

Naskiĝis 10 mar 1917 en Geelong, Aŭstralio. Vizitis la Universitatojn de Tasmanio kaj de Oksfordo (stipendio Rhodes; diplomoj LL.B., B.A.). I.a. diplomaciaj oficoj: Ĉefkonsulo en Ĝenevo, Konstanta Delegito ĉe la Eŭropa Oficejo de UN 1953-56; delegito al la Ĝenerala Asembleo de UN, 4-a kaj 6-a sesioj; Komisiito de Aŭstralio en Singapuro, Brunejo, Saravako kaj Norda Borneo 1956-57; nun Aŭstralia Ambasadoro en Bruselo de post 1965. Brita ordeno: C.B.E. Aŭtoro de artikoloj en la angla, franca, nederlanda kaj Esperanto pri internacia ekonomiko kaj politiko. Kun-aŭtoro de "International Law in Australia" (Internacia Juro en Aŭstralio).

Lernis Esperanton kiel studento en 1937. Fondis klubon en Canbera, 1950. Tradukis en Esperanton la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj kaj la Ĉarton de UN. En 1953 verkis la raporton pri Esperanto en Aŭstralio, kiun la registaro sendis al Unesko. Aranĝis eldonon de E-broŝuroj de MMO, OMS, ILO, IASS, IKEM ktp. Prezidanto de AEA 1960-61.



## Miguel Sancho-Izquierdo

Naskiĝis en 1890. Studis en Zaragoza juron kaj la fakultaton filozofio-beletro. Doktoriĝis en la Universitato de Madrid. En la Universitato de Zaragoza fariĝis docento en 1918, profesoro pri natura juro kaj jura filozofio en 1920, Rektoro en 1941 kaj, post emeritiĝo, Honora Rektoro en 1954. Estas honora doktoro de la Universitatoj de Montpellier, Bordeaux kaj Navarra. Nun membro de la Supera Konsilo de Sciencaj Esploroj kaj ankoraŭ profesoro pri jura filozofio en la Universitato de Navarra. Ordenoj: la Grandaj Krucoj de Alfonso Xa la Saĝa kaj de Civila Merito, Honora Kruco de San Raimundo de Peñafort, Medalo de Merito en la Laborado. Siatempe deputito de la partio Popola Agado.

Lernis Esperanton en 1908 kaj partoprenis la Universalan Kongreson en Barcelona, 1909. De post 1962 Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio kaj, plej laste, Prezidanto de LKK por la 53-a en Madrid, 1968.



## Yrjö Väisälä

Naskiĝis en Kontiolahti, Finnlando, 6 sep 1891. Doktoriĝis pri fiziko en 1923, kaj okupis jenajn oficojn: astronomia asistanto kaj observisto en la Universitato de Helsinko, 1910-14; magnetisto en la meteologia instituto, 1913-15; matematikisto de la vivasekura societo Suomi, 1915-18; ŝtata geodeziisto, 1918-24; en la Universitato de Turku provizora profesoro en 1923-24, profesoro de 1925 ĝis 1951, profesoro pri astronomio ekde 1927 kaj direktoro de la astronomia-optika instituto ekde 1952. Membro de la Akademio de Finnlando de 1951 ĝis la emeritiĝo en 1961. Publikigis multajn studojn en la fakoj fiziko, astronomio kaj geodezio. Mondfama precipe pro sia kontribuo al la pliprecizigo de la mezurado de distancoj.

Lernis Esperanton ĉ. 1917. Jam dum multaj jaroj publikigas finnlingvan amatorastronoman revuon kun resumoj en Esperanto. Eltrovis grandan nombron da asteroidoj kaj donis al du el ili la nomojn "Zamenhof" kaj "Esperanto".



## KAJ LA NOVAJ ESTRARANOJ DE UEA

### Peter Zlatnar

Fondis Esperanto-Rondon de Ljubljana, 1933. Post la milito estis aktiva en la slovenia kaj tut-jugoslavia movado. Fariĝis Prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Federacio kaj restis Prezidanto de la posta Jugoslavia Esperanto-Ligo ĝis 1961. Redaktis "Jugoslavio kaj ĝiaj popoloj" (1953) kaj "Esperanto kaj ĝia instruado en lernejoj" (1959). Estis longe aktiva sur la lerneja kampo: membro de KKL 1964-1966, ekstera kunlaboranto 1967-. Estis komitatano A por Jugoslavio de 1959 ĝis 1967, poste komitatano C. Nun estrarano pri kongresoj.

Estas doktoro de dentoscienco, profesie dentkuracisto. Tradukis "Morfologia atlaso de homa dentaro" (1956).

### Ulrich Lins

Naskiĝis 4 aŭg. 1943. Lernis Esperanton en 1958. Studas historion kaj politikan sciencon en Universitato de Köln, Germanujo. Aktiva en Germana Esperanto-Junularo, estis ĝia estrarano de 1963 ĝis 1966. Kasisto de TEJO de 1964 ĝis 1966, poste vic-prezidanto, estrarano pri regiona agado. Verkas libron pri la situacio de la germana Esperanto-movado dum la Tria Regno (1933-1945). Estas nuntempe redaktoro de "Pozitive", organo de GEJ, kaj poste transprenos redaktorecon de "Okcidentgermana Revuo". Estas ligita al la Estraro de UEA kiel reprezentanto de TEJO, kun ĉiuj rajtoj de estrarano escepte de la voĉdona.





Eble la plej junaj "instruistinoj" de Esperanto en la mondo ĉi-jare havas konkretajn atingojn por prifieri. Ili estas la 15-jara Christel Aderjan (vidu la kovrilan foton) en Neustadt (Rejnlando), Germanujo, kaj ŝia 16-jara koleginino Benata Koopmans en Leiden, Nederlando (foto sube). Ambaŭ atingis siajn sukcesojn en la kvara klaso de la gimnazio. De post februaro 1967 Christel praktike instruas al siaj samklasanoj en la Ŝtata Novlingva Gimnazio (kvankam sen oficiala instru-diplomo); Benata, aliflanke, ankoraŭ ne instruas praktike, sed de post majo 1967 posedas la necesan diplomon por oficiala instruado en lernejoj. Temas pri la Supera Diploma de la Ĝenerala Nederlanda Esperanto-Ekzamena Komisiono, kiun ekde 1968 anstataŭos la jam enkondukita ŝtata diploma laŭ la instru-leĝo de 1964.

## La knabinoj mem postulis

Ke Christel Aderjan instruas al 12 aliaj knabinoj, tion ne iniciatis la aŭtoritatoj. La knabinoj mem tiom enviis ŝin pro la multaj leteroj, kiujn ŝi ricevis de Esperanto-korespondantoj en Belgujo, Japanujo, Sudameriko kaj Svislando, ke ili entuziasme postulis de ŝi lecionojn. Sed la lecionoj, kiuj sekvas tuj post la oficiala instruado, okazas en konsento kun la lernejestro kaj sub kontrolo de la klasestro, s-ro Schulz. Kiel diris tiu lasta: "Mi volonte subtenis la deziron de la knabinoj, lerni en nia gimnazio Esperanton, ĉar la junularo trabatu mem sian vojon en la estontecon. La ĝojo pri la lernado estas salutinda — ĝi estas hodiaŭ bedaŭrinde tiel malofta."

## En televido kaj radio

Lokan sensacion faris en Neustadt la vizito de televido kaj radio Südwestfunk, kiuj filmis kaj surbendigis parton de la kurso. Ankaŭ Benata aperis, kun sia pli juna fratino Donita, antaŭ la mikrofono de la nederlanda radio NCRV. En ambaŭ landoj la gazetaro publikigis ampleksajn intervjuojn. Sekve interesiĝis la tuta instruistaro. La instruistino de la angla lingvo en Neustadt komentis: "Mi estis certe tre surprizita, kiam mia lernantino Christel montris al mi la Jarlibron de UEA. En Kanado, mia hejmlando, ekzistas eĉ multaj esperantistoj. Tion mi eĉ ne konjektis."

En sia persona historio jam tre diferencas la du junulinoj. Benata devenas el familio, en kiu Esperanto establiĝis kiel hejma lingvo. Ĉiuj kvar infanoj parolas denaske la lingvon. "Pli frue ni parolis sole nur Esperanton", klarigis Benata, "sed pro la lernejo tio nun iom malpliigis".

Christel rakontas alie: "Antaŭ tri jaroj vizitis s-ro Erasmus Zilles nian familion kaj rakontis pri sia vojaĝo ĝis Japanujo per Esperanto. Mi tiam intencis lerni tiun ĉi lingvon,

kaj mi faris tion ĉe s-ro Zilles. Post unu jaro mi mem korespondadis kaj post du jaroj estis kapabla libere paroli. En la unua klaso de la gimnazio mi devis lerni la anglan lingvon. Tio ne estis tre facila. Poste mi lernis Esperanton — kia diferenco!" Nun ŝi instruas ankaŭ sian 10-jaran fraton kaj la kuzinon.

## Planoj por la estonteco

Christel uzas en sia kurso lernolibron (de Wingen), "sed mi klopodas, ke miaj kunlernantinoj lernu libere paroli, kvazaŭ per la rekta metodo. Mi havas grandan plezuron instrui, kaj ankoraŭ pli plaĉas al mi, se miaj kunlernantinoj bone lernas Esperanton." Se oni demandas pri ŝiaj planoj, ŝi respondas: "Mi ne scias precize, kiun profesion mi elektos, sed — se mi fariĝus instruistino — mi ne forgesus instrui ankaŭ Esperanton, ĉar mi estas nun (kun permeso de miaj gepatroj) dumviva membro de UEA."

Benata Koopmans ja intencas iam utiligi sian instru-diplomon, sed esperas unue studi teologion en la Universitato de Leiden. En ĉiu okazo ŝi ankaŭ jam ambicias la Internacian Diplomon de UEA, por kiu ŝi rajtos ekzameniĝi post la abiturienta ekzameno. Ni deziru al ŝi anticipe, same kiel al Christel Aderjan, plenan sukceson!

*Kiel diligenta deĵorantino en la 52-a Unversala Kongreso en Rotterdam, la 16-jara Benata Koopmans, same kiel aliaj ŝiaj familianoj, estas jam konata al multaj legantoj.*





**Esperanto-English Dictionary** (vortaro Esperanta-angla), de Montagu C. Butler. Eld. BEA, Londono, 1967. 450 p. 18 x 12 cm., bd.\* 12,50 gld.

La apero de nova granda vortaro E-angla estas vere salutinda evento. Butler estas pioniro de Esperanto en Britujo, Akademiano, aŭtoro de unuaranga lernolibro, kreinto de la mondkonata BEA-Biblioteko. Tiu ĉi vortaro, iel lia ĉefverko, celas anstataŭi tiun de Mil-lidge (lasta revizio: 1924).

Nepre ĝi estas la plej bona angla E-vortaro ĝis nun aperinta. Ĝi estas bazita principe sur la Plena Vortaro kaj ties Suplemento, do liveras relative kompletan ĝisdatan gvidilon al la lingvo. Prave ĝi registras plurajn ĵus modifintajn vortojn mankantajn eĉ en la Grand Dictionnaire de Waringhien (*aprezi*, *festivalo*, *ŝlifi*). La kolekto de botanikaj kaj zoologiaj nomoj estas aparte riĉa kaj zorge kompilita. La prezento estas ampleksa, kun multaj ekzemploj Zamenhofaj kaj aliaj.

### 99-procente bonega

La vortaro estas 99-procente bonega. Tamen . . . . La spacoŝpara uzo de krampoj estas konfuze dusenca. *Kateĥ(k)ismo* (anstataŭa ebleco), sed *klemat(id)o* (aldona/foriga ebleco); *EVOLU(CI)-i*, ambaŭ formoj oficialaj (tion indikas majuskligo), sed *DIST(ANC)-o*, nur unu oficiala. Pseŭdosufiksoj kaj apenaŭsufiksoj intermiksiĝas sendistinge kun sufiksoj: *dikt-i*, *-aĵo*, *-afono*, *-ografo* ktp — kio misprezentas la aglutinan strukturon de Esperanto.

Mankas pli ol 200 el la radikoj troviĝantaj kaj en PV kaj en GD sen signo de malprefero; same el la Suplementaj mankas 200. Tiel oni ne trovas mencion de — ekzemple — *anemometro*, *demarŝo*, *dinaro*, *diplodoko*, *eksponencialo*, *jakobeno(z)*, *Kalvario(z)*, *kolĥozo*, *konaksa*, *korso(z)*, *kuspi*, *leŭkemio*, *luidoro*, *oranĝerio(z)*, *provoso*, *stilistiko(z)*, *tendro(z)*, *velaro*; *analgezio*, *bazuko*, *cionismo*, *depozicio*, *donkiĥoto*, *freŭda*, *maĥinacio(z)*, *nazio*, *paleolitiko*, *pediatr(i)o*, *peticio*, *predikativo*, *skizoida*, *smokingo*, *trilogio* — ĉiuj ofte renkontataj en la literaturo. Se oni memoras, ke Butler estas kvakero kaj vortaristo, freŭde frapa estas lia senintenca preterlaso de *Krist-o*, *-ano*, *-anismo* kaj de *leksikologio*! Malpli frapa estas la pruda neenmeto de *bideo*, *cico*, *donĵuano*, *hetajro*, *pederastio*, *putino*, *satiriazio*, *supozitorio*. El land- kaj popol-nomoj mankas *arĵo*, *Balkano*, *gallo*, *heleno*, *indiano(z)*, *judo(o)*, *kelto*, *valono*, *vasko*.

Egale mankas tiuj variantaj formoj, kiujn Butler malpreferas. Tiel falas *abolicii*, *ambasado*, *amplifiki*, *disertacio*, *forfikulo(z)*, *kvalifiki(z)*, *makrocefalo*, *referi*, *solisto(o)*, *trabanto*; *difterio*, *profilaktiko(z)*, *pulovero*, *radiatoro*, *skotero*, *tajfuno*. Aliflanke unu vorto el la Suplemento estas zorge kopiita eĉ kun sia preseraro (*emperono* anst. *empenerono*)!

La angla lingvaĵo de Butler estas kelkloke tre arkaisma: *tosh!* (*aĉ!*), *motor-omnibus* (*aŭtobuso*), *motor-spirit* (*benzino*), *honest Injun!* (*senblage!*), *sweetmeat-box* (*bombonujo*), *give a wiggling to* (*skoldi*), *gooseberry* (*ŝaperono*), *link* (*torĉo*), *valise*, *hand-bag*, *portmanteau* (*valizo*). Fojfoje mankas la plej trafa ekvivalento, aŭ unu grava ekvivalento, ekzemple sub *adjekto* (*adjunct*), *degradi* (*demote*), *glacea 2* (*glacé*), *hemikranio* (*migraine*), *kosmo* (*space*), *parafo 2* (*initials*), *pluraj* (*several*), *tinuso* (*tuna*).

Plej bedaŭrinda el ĉio estas trideko da rektaj eraroj, plejparte anglismaj difinoj de "falsaj amikoj": tiel *alternativo* (kvazaŭ 'alia eblo'), *diveni 1* (kv. 'konjekti'), *flakono* (kv. 'botelego'), *kaserolo* (kv. 'stufpoto'), *klaŭzo 1* (kv. 'propozicio', kaj sub *propozicio* mankas tiu senco gramatika), *mikrometro* (kv. mezurunuo anst. instrumento). Anglisme tro vastaj estas la difinoj de *adekvata* (kv. 'sufiĉa'), *anticipi*, *ekzalti*, *intervjui*, *kompetenta* (kv. 'kapabla'), *pilono*; aliflanke mankas la turisme grava senco financa de *devizo*, same la komunlingva senco de *valuto* (*currency*). *Volumena* devus esti ne 'voluminous', sed 'volumetric'.

Troviĝas diversaj nekonsekvencaĵoj: sub *arkta* menciĝas *antarkta*, sed en la nomlisto — *Antarktiko*. Simile *melopsitako* (*budgerigar*), sed sub *papago* — *melopsito*. *Semido*, sed *antisemito*. *Gerilo*, prave, 'guerilla . . . war' sed *partizano* '= *gerilo*'.

Grava ŝango de radikokategorio troviĝas ĉe *komplik* (-o 'complicity' anst. 'accomplice'). *Fabrikejo* (anst. *fabriko*), tiu konata strangaĵo de anglalingvaj E-istoj, ripetigis ankoraŭfoje. Kontraŭe al la hodiaŭa tendenco, Butler evitas formojn de botanikaj kaj zoologiaj nomoj finiĝantajn per *-il'*, *-in'*, *-ul'*, preferante formojn per *-el'*, *-en'*, *-ol'*.

Mi bedaŭras la provon revivigi la mortintajn eksperimentojn *brodkasti*, *desaponti*, *ekspekti*, *neksta*, *knoto* (absolute establiĝis ja *nodo* malgraŭ De l'Isle 1908), *-ojd-* (anst. *-oid-*). Balastaj estas *dioskoreo* (= *ignamo*), *citelo* (= *zizelo* (f)). Kial mise *apokopeo*, *diereso*, *polinomia*, apud sametimologiaj *sinkopo*, *aferezo*, *binomo*?

Inter la pli ekstravagancaj neologismoj de Butler estas *buno*, *krumpeto* kaj *skono* (anglaj bulkoj/kuketoj), *dazli* (*blindumi*), *hekli* (*brue pridemandi politikiston*), *instanto* (*momento*). Sed oni devas memori, ke ĝuste Butler siatempe lanĉis *murdi* kaj *heĝo* . . .

J. C. Wells (Londono)

### KOREKTO SEPTEMBRA NUMERO

Sur paĝo 128 la teksto super la dekstra foto devus esti: "s-ro E. L. M. Wensing, s-ino E. Carlén kaj s-ro H. W. Holmes." Ni petas pardonon!



**Suito '67**, originala hajkaro. Div. aŭtoroj. Eld. Hajkista Klubo, Oosaka, 1967. 51 p. 18 x 11 cm., ofsetita.\*

En la nuna (kiel ŝajnas al mi) kultura paŭzo de Esperanto, unu tre ĝojiga fenomeno estas la vigliĝo de niaj japanaj verkistoj. La hajko, tiu 17-silaba poemeto, jam sorĉis multajn esperantajn poetojn — ĉefe okcidentajn, kies interpreto ne ĉiam renkontas plenan aprobon de la indiĝenaj amatoroj. Nun jam ses el tiuj lastaj prezentas al ni kolekton de hajkoj originalaj, tre sukcesaj *ankaŭ* por la okuloj de la okcidentaj kolegoj. Ili estas: Tanaka (delikata sopiremo aliteraciema) — Dorso doloras/vipe

de l' vento vintra,—/old' en mi ploras"; Yamada (optimismo kaj natursento) — "En vintra suno/al lag' folioj falas,—/ĥoro sur skuno"; Murata (aktualeco kaj tenero) — "Mi kun abako/laboras ĝis noktmezo/jam sen tabako"; Tomita (moderno urba kaj kampara) — "afiŝas feste/ni; bru' maŝina post ni/en nokto froste"; Ueyama (diboĉa koloraro, ekscita profundo) — "Laŭ briz' scintilas/salikaj ĝermoj geme./Ĉielo lilas"; Miyamoto (sentumoj kaj volupto) — "Printemp' fieras/kun abdomen' velura,/ŝi des pli belas". La poemetoj en ĉi tiu libro nur ŝajne naivecas: ili indas unuope primediton. Tre leginda libreto.

W. Auld (Skotlando)

**La kaŝmira kanto**, legendo de Ŝaraf Raŝidov. El la rusa (?) tr. Petro Poliŝĉuk. Eld. Komisiono de esperantistoj, Taŝkent, 1967. 26 p. 23 x 15 cm., ofsetita.\* 1,— gld.

Temas pri tre meznivela traduko de tre meznivela verko — "meznivela", ĉar en Esperanto "malalta" havas alian signifon. La temo estas la fantazia amrakonto de bela floro "nargis" kaj nigra vespaspekta polenporta insekto "bambur" (sanskrite kaj hindie: bhramar), kiu funkcias simile al la papilio: sed nenie estas gloso pri ĉi tiu fakto (mi, hindo, komprenis, sed neniuj alia komprenis). Tute ne estas stilo konforma al ĉi tia rakonto. Estas senbezona neologismoj (primavero, old'-tagaj?) kaj malpli belaj poemtradukoj. Malbela vortordo (ekz-e "la sin kaŝintaj de li amikinoj"), kaj eraroj (raviganta, min haltos, min brulos, k.s.) troviĝas.

Aŝvinikumar (Ilahabad)

**Les langues internationales**, de Pierre Burney. Eld. Presses Universitaires de France, Paris, 1966. 162 p. 17,5 x 11,5 cm.

La unuan eldonon de ĉi tiu libro Lapenna akre atakis en "Esperanto" de julio-aŭgusto 1962. En la dua eldono multajn el la plej evidente kontraŭfaktaj asertoj pri la *lingvo* Esperanto, ekz. pri la neekzisto de "radaro" kaj "hospitalo", la aŭtoro korektis. Tamen liaj senbazaj asertoj pri la Esperanta *literaturo* restis.

W. A. Verloren van Themaat (Amsterdam)

**El poezio de Julio Baghy**. Recitas Nevenka Imbert kaj Mladen Ŝerment. Eld. Studenta Esperanto-Klubo, Zagreb (1967). Disko 17 cm., 33 r/m, daŭro 17 min.\* 3,80 gld.

Julio Baghy estis granda esperantisto; tamen, kiel poeto, li ja ne estis grandulo. La Antaŭparolo de "Ora duopo" pravas: "La vortmuziko en la poemoj de Baghy ... kelkfoje fariĝis preskaŭ la sola ilia ingredienco". La dua eco de la Baghy-a muzo estas sentimentalismo. Tion ni frape aŭdas el la recenzata disko. Kaj ĝuste ĉio ĉi certigos al ĝi sukceson!

Generale, ne malutilus iom pli da vario; entute tamen, la multesperta aktoro kaj la kapabla amatorino faris bonan laboron. En Roterdamo la kongresanaro ĝuis ĉi tiun ilian programon viv-voĉe. La teĥnika flanko estas senripoĉa: sono pura kaj natura.

N. Rytjkov (Londono)

**Intensiva kurso de Esperanto**, de T. Nakamura. Eld. Kosmo, Osaka, 1966. 40 p. 18 x 13 cm. Por japanoj, sed uzebla internacie. 1,25 gld.\*

Kiel oni mezuru intensivecon? Sendube per la denseco de la materialo koncentrigita en ĉiun lecionon. La verko de s-ro N. (26 lecionoj en 40 p.) plene rajtas je sia titolo; kaj kvazaŭ agnoske al la varieco de ensorb-kapablo inter homaj mensoj la koncentrado de la leciona dozo varias ankaŭ. Tiel flanke de la multeco en lec. 9 (ĉiuj k-vortoj plus *da, de, ĉjo, njo*), 10 (ĉiuj korelativoj), 13 (kondiĉoj kaj nerekte demando) troviĝas respirejoj, kiel lec. 5 (salutoj), 11 (*por, pro, ec, ek, ad*), 20 (*ĥoro, on, el-, en-*). La prezentado de la pasivaj participoj estas modela (lec. 21). Pro la nemulteco de la klarigaj notoj la verko taŭgas ankaŭ por ne-japanoj; kaj mi mem uzos ĝin.

D. B. Gregor (Britujo)

**La voĉalbumo de Esperanto**. (1) Prof. D-ro Ivo Lapenna, (2) S-ino Ljuba Knjažinskaja-Lapenna. Eld. Amo-Alkademio, Japanujo, (1967). Fleksebla disko 33 r/m., 17 cm. diam., duflanka.\* 3,— gld.

Ĉe la unua flanko de la disko la prezidanto de UEA insistas, ke antaŭkondiĉo por bona utiligo de Esperanto estas la mastrado de la lingvo flanke de ĉiuj ĝiaj uzantoj; liaj vortoj estas kiel kutime instruaj kaj inspiraj. Ĉe la alia flanko s-ino Ljuba Lapenna ĉarme rakontas interesaĵojn pri Siberio. Bedaŭrinde tia altnivela kaj varia enhavo estas bagatelita de la teĥnika miskvalito: ne ĉio estas kaptebla ĉe la unua aŭdo; tial uzado en publika kunveno ŝajnus nerekomendinda.

C. Soldati

esperanto  
oktobro 1967





Vilho Setälä

**Fortoj de l'vivo**, verkaro de Vilho Setälä. Eld. Fondumo Esperanto, Helsinki, 1967. 208 p. 21 x 15 cm., ofsetita, ilustr.\* Bd. 15,— gld; broŝ. 8,— gld.

Ofsete presita libro ne plu estas maloftaĵo. Sed ĉi tiu libro de V. Setälä estas io tute nova (almenaŭ por mi): ĝi konsistas el liaj preskaŭ cent artikoloj ofsete represitaj el la E-revuoj, en kiuj ili iam aperis en la daŭro de multaj jaroj. En tiuj artikoloj, kiuj en tabelo de l' enhavo estas klasitaj sub la titoloj: La movado, Literaturo originala, Poezio kaj Prozo tradukitaj, Recenzo/biografio/eseoj, La lingvo, Scienco kaj Tekniko, Artoj ktp, montriĝas la multfakaj talentoj, kiel "fortoj de l' vivo", de

Vilho Setälä, Akademiano kaj la eminenta pioniro de nia movado en Finnlando.

En la volumo ĉiu leganto povas ĝui multajn pecojn laŭ sia bontrovo kaj gusto. Mi persone profitis el liaj eseoj historiaj kaj kulturaj pri Finnlando kaj lingvaj. Abundas saĝaj konsiloj. Ekz-e, lia sugesto pri la foto-ofseta reeldono de gravaj verkoj "por la kontinua evoluo de esperanto" (p. 163-4) estas atentinda. (Sed ĉu oni povus kategorie aserti, ke "la sono ĥ estas fakte nebezona", dum ekzistas la diferencigo inter ĥoro/koro kaj ĥolero/kolero?)

La tuta enhavo estas varia kaj bunta, des pli, ke ĝi estas artisme redaktita per enmeto de abundaj vinjetoj, fotoj (portretoj kaj pejzaĝoj) kaj bildoj. T. Nakamura (Kioto)

### RICEVITAJ ELDONAĴOJ

(\* = mendebla ĉe la Libroservo de UEA)

**La germana popolo kaj la Unuiĝintaj Nacioj.** Eld. "Zeit im Bild", Dresden, 1967. 63 p. 23 x 16 cm. 0,50 gld.\*

**Vortoj de prezidanto Maŭ zedong.** Fremd-lingva Eldonejo, Pekino, 1967. 343 p. 13 x 9 cm. Frontispico. Plaste bd. 1,— gld.\*

**Por la praktikantoj**, de P. Babin. 2-a eld. Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, Baugé, 1967. 85 p. 27 x 21 cm., ilustr. Tutesperanta lernolibro por kursoj.\*

**Vojaĝimpresoj de egipto tra Eŭropo kaj Azio per Esperanto**, de Nassif Isaac. Eld. la aŭtoro, Kairo, 1967. 64 p. 24 x 17 cm., il. 2,50 gld.\*

**Procezo**, aŭtobiografia novelo de Tada tacuo. El la japana tr. Aojama tooru. Eld. la aŭtoro, Tokio, 1967. 38 p. 18 x 12 cm., bd.\* 1,— gld.

**Pri arto kaj morto**, orig. novelaro de Miyamoto masao. Eld. Esperanto-Kenkjuŝa, Gama-gori, 1967. 170 p., 18 x 13 cm., bd. Il.\* 7,50 gld.

**Martinus kosmologio — mallonga superri-gardo.** Eld. Int. Korespond-lernejo pri Martinus Kosmologio. 1963. 16 p. 21 x 14,5 cm., ilus. 0,25 gld.\*

**Historio de la mondlingvo**, de E. Drezen. Tria eld. (foto-represo), Pirato, Oosaka, 1967. 240 p. 26 x 17 cm., bind., ilus. 12,— gld.\*

**Mi volus...**, poemo de Sipke Stuit. Kun trad. franca kaj frisa. Eld. la aŭtoro (1967). Faldfolio ilus. 1,50 gld.\*

**Oomoto — sepdekjara. 1892-1962.** Eld. Oomoto, Kameoka, 1967. 20 p. 21 x 15 cm., ilus.

**La japano SUZUKI Sin'ichi. Por la feliĉo de ĉiuj geknaboj**, de Muramacu kijoe. Eld. la aŭtorino, Tokio, 1967. 24 p. 18 x 13 cm., ilus. 0,50 gld.\*

**Kongreslibro.** Eld. 28a Hispana Kongreso de Esperanto, Zaragoza, 1967. 30 p. 22 x 15 cm., ilus.

**Kyoto.** Serio de 8 koloraj poŝtkartoj, eld. KLEG, Oosaka, 1967. Kun Esperanta teksto.\*

**Pluvas sur la arbaron** (Rakontoj pri la Lao-popolo). Diversaj aŭtoroj. Eld. Neo Lao Haksat (Hanojo), 1967. 88 p. 19 x 13 cm.\*

**Katalogo de la Hungarlanda Esperanto Biblioteko.** Komp. György Gyuris. Szeged, 1967. 288 p. 20 x 9 cm., ofsetita.\*

**A Research Bibliography on Esperanto and International Language Problems** (Esplorbibl. pri Esp. kaj internacilingvaj problemoj), komp. Humphrey Tonkin. Eld. JEN, New York, 1967. 14 p. 20 x 12,5 cm., ofsetita. 1,75 gld.\*

**La voĉalbumo de Esperanto.** (3-4) La voĉoj de s-ro Julio Baghy. Eld. Amo-Akademio, Japanujo, (1967). Fleksebla disko 33 r/m., 17 cm. diam., duflanka.\* 3,— gld.

**Populorum progressio**, encikliko de Paulus P.P.VI. Eld. Ekumena Esperanto, (Svisujo) 1967. 24 p. 21 x 14 cm.\* 0,45 gld.

**Seznam 808 nejužívanějších slovních kmenů v mezinárodním jazyce Esperanto** (808 plej oftaj radikoj), de Theodor Kilian. Eld. Distrikta Kleriga Domo, Třebíč, 1966. 31 p. 17 x 12 cm. Esperanta-ĉeĥa.\*

**Skribaj ordonoj al trajnoj kaj substituaĵ metodoj**, de Joachim Giessner. **Metodoj de aŭtomata influo je trajnveturado**, de Erwin Böhm. Eld. GEFA, Willi Brandenburg, Hochbaubahnmeisterei, Schaumburgstr. 13, D-44 Münster. Resp. 12, 19 p. 30 x 21 cm., fotopres., ilus. Riceveblaj kontraŭ po 1 respondkupono.

### CITAĴOJ

**"Tamen"**, Varsovio: "Kaj eble Esperanto havas neniujn ligojn kun la pola kulturo, kvankam ĝi naskiĝis en nia lando? La problemoj estas tiom pli gravaj kaj por ni iusence danĝeraj, ke en la lasta tempo Izraelanoj ĉiam pli laŭte diras, ke la kreinto de la Internacia Lingvo estas ilia samnacio kaj ke li al ili apartenas."

**L. L. Zamenhof:** "Reciproka malpaco inter la homoj neniam ĉesos, ĝis la homoj alkiutimiĝos starigi la nomon 'homo' pli alte ol la nomon de gento..."



## LAŬLANDE

## Aŭstrujo

● La Eŭropa Esperanto-Kongreso en Innsbruck, 23-30 jul 67, akceptis rezolucion pri praktika apliko de Esperanto kaj decidis eldonon de "Eŭropa Esperanto-Revuo".

## Ĉeĥoslovakujo

● Senpagajn korespondanconcojn publikigas en sia regula Esperanto-rubriko la slovaka ĵurnalo "Smena", p/a Ján Lamačka, Trenčín, Pod Sokolicami 9.

## Danlando

● La ĉi-jarajn internaciajn feriajn Esperanto-kursojn en Helsingør partoprenis kursanoj el ĉiuj skandinaviaj landoj (inkl. Islandon) plus ses kontinentaj landoj.

## Finnlando

● Pri la 80-jara datreveno de la publikigo de Esperanto raportis minimume 37 ĵurnaloj. La televido intervjuis kun mag. V. Setälä — en Esperanto, kun finnaj subtitoloj.

## Germanujo

● Tritagan konferencon en Rostock (9-11 jul) partoprenis 73 personoj el 6 landoj. Prelegis prof-oj Bokarev (Moskvo) kaj Falkenhahn (Berlin). Raportis radio kaj televido.

## Hindujo

● Informcentron por la gazetaro fondis s-ro Surendra K. Jain. Adreso: Esperanto Information Centre, 1530 Nai Sarak, Delhi-6.

## Hispanujo

● Dank'al donaco de libroj de s-ro J. Ph. Punt el Utrecht, Nederlando, la biblioteko de la urba institucio "Caja de Ahorros de Sabadell" starigis Esperanto-sekcion.

## Nov-Zelando

● Televido intervjuis la prezidanton de NZEA, prof. C. J. Adcock, okaze de la translokigo de la 52-a UK kaj okaze de Esperanto-ekspozicio en la Universitato Victoria, Wellington.

## Soveta Unio

● La 9-an Baltlandan Esperanto-Tendaron en Vilnius, Litovujo, partoprenis unuafoje eksterlandanoj. Entute ĉeestis ĉ. 500 personoj el 7 landoj.

## Usono

● La studenta organizaĵo LUNA, kiu en sia agmaniero celas imiti la funkciadon de Unuiĝintaj Nacioj, akceptis per granda plimulto rezolucion, kiu favoras Esperanton.

## LAŬFAKE

## Astronomio

● La Popola Astronomia Observatorio en Žilina, Ĉeĥoslovakujo (Ludová Hvezdáreň Mesta Žiliny) eldonos bultenon "Astronomiaj informoj" kaj organizos en 1968 kongreson en Esperanto de amatoraj astronomoj.

## Bibliaj studoj

● Ekde januaro 1968 reaperos pligrandigita la "Biblia Revuo". Eldonos la Itala Biblia Asocio kunlabore kun la Esperanto-Grupo de Ravenna. Ĝi estos en 1968 dumonata.

## Filatelo

● La unuan fojon la poŝto en orienta Germanujo uzos specialan stampon pri Esperanto: okaze de ekspozicio 7-15 okt. 1967. Specialan koverton kun la stampo sendas kontraŭ 3 rpk Germana Kulturligo, DDR-9033 Karl-Marx-Stadt, pf 7.

## Kino

● La filmo "Esperanto-fonto", montrita dum la 52-a UK en Rotterdam, aperis la 5-an de aŭgusto en la hungara televido.

## Literaturo

● La tre ŝatata angla infanlibro "Winnie-the-Pooh" de A.A. Milne jam aperis en multaj tradukoj. Eĉ latina eldono, ekzemple, vendiĝis en 105 000 ekz. en 6 jaroj. Nun ekzistas bona Esperanta traduko, kiu aperos, se sufiĉe da antaŭmendoj atingos Esperanto Information Centre, 156 Fifth Avenue (821), New York, N.Y. 10010, Usono. Skribu tuj!

## Sporto

● Nur nun ni eksciis, ke la Internacia Olimpika Komitato respondis negative al la letero de hungaraj ĉampionoj kaj sportistoj pri la lingva problemo (Vidu aprilo 1966, p. 61). Unu el la deklaritaj celoj de la Olimpikoj estas "krei internacian amikecon". Evidente sufiĉas rideti, parolo ne necesas.

## Turismo

● La Turisttrafika Asocio de Oslo, kiu jam eldonis filmon kaj (sesfoje) prospekton en Esperanto, nun pretigis ankaŭ serion da diapozitivaj kun akompana prelego-teksto Esperanta. Klubo povas senpage prunti ĝin de NEL, Boks 942, Oslo 1, Norvegujo.

*S-ro Punt (dekstre) kun la direktoro de la biblioteko en Sabadell (vidu Hispanujo)*







## 53-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Madrid, 3-10 aŭgusto 1968

**Alta Protektanto:** Ĉef-Generalo Francisco Franco, Ŝtatestro de Hispanujo.

**Konstanta Adreso:** Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

### OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 1

Rotterdam, 7 sep. 1967

#### Enirvizoj

La oficialaj instancoj en Hispanujo garantiis al LKK, ke enirvizoj estos donitaj sen distingo pri la landoj, el kiuj venas la kongresanoj.

#### Kotizoj

Aliĝkotizoj validaj ĝis 31 dec. 1967 estas:

|                                      |           |
|--------------------------------------|-----------|
| Kongresano .....                     | 70,— gld. |
| Edz(in)o de kongresano .....         | 30,— gld. |
| Universitata studento ĝis 30-j. .... | 35,— gld. |
| Junulo ĝis 20-jara .....             | 21,— gld. |
| Blindulo .....                       | 28,— gld. |

Rabatoj: a) Individua membro de UEA, kiu ricevas la Jarlibron kaj la Revuon "Esperanto", rajtas rabaton de 20,— gld.; b) Individua membro de UEA, kiu ricevas nur la Jarlibron, rajtas rabaton de 10,— gld.; c) Edz(in)o de individua membro (de ambaŭ kategorioj) rajtas rabaton de 5,— gld.

Kongresano, kiu pagas la plenan kotizon (70,— gld.), ricevas la revuon "Esperanto" dum la tuta jaro 1968.

#### Unua Bulteno

La 4-paĝa grandformata, ilustrita Unua Bulteno kaj la Aliĝilo estas riceveblaj senpage ĉe la Landaj Asocioj kaj Ĉefdelegitoj de UEA, ĉe la Kongresaj Perantoj kaj ĉe la konstanta adreso de la Kongreso.

#### Glumarko

Estas aĉetebla ĉe la Libro-Servoj de la Landaj Asocioj kaj de UEA bela kolora glumarko eldonita okaze de la 53-a UK. Prezo: 0,50 gld. (2 st.) por 10-glumarka folio.

#### Arta Festivalo

En la kadro de la Kongreso okazos la 4-a Internacia Arta Festivalo.

#### Infana Kongreseto

Paralele kun la Universala Kongreso okazos la 11-a Internacia Infana Kongreseto.

G. G. Pompilio

Konstanta Kongresa Sekretario

### LA K.K.S. EDZIĜIS

La Konstanta Kongresa Sekretario de UEA, s-ro G. G. Pompilio, edziĝis la 8-an de septembro, en Rotterdam, al f-ino Hiroko Takano el Tokio. Al la nova paro ni deziras daŭran feliĉon!

## letero

### PRI FAKAJ REPRESENTANTOJ

Ŝajnas al mi, ke la fakaj organizaĵoj malmulte kreskos laŭ membronombro aŭ agadkvanto, ĝis ekzistos reprezentanto de ĉiu organizaĵo en ĉiu lando, kie troviĝas esperantistoj. Ĉiu landa asocio nepre devus havi estraron pri fakaj organizaĵoj, kaj unu el ties plej urgaj taskoj devus esti la starigo, en la propra lando, de reprezentantoj. Unu avantaĝo de tiu aranĝo estus, ke en la nacilingva informa literaturo oni povus prezenti imponan liston de naciaj reprezentantoj de ampleksa serio da fakaj organizaĵoj.

Imagu, ke brito petas de la Brita Esperantista Asocio nacilingvan informan broŝuron. Li aparte interesiĝas, ni diru, pri ŝakludado, kaj en la broŝuro jen britaj nomoj kaj adreso apud la vorto "chess" (ŝakludo). Li turnas sin (nacilingve, kompreneble, ĉar li ankoraŭ eĉ ne decidis, ĉu lerni Esperanton aŭ ne) al tiu persono kun la demando: "Se mi lernus Esperanton, kiel ĝi utilis al mi kiel ŝakludanto?"

Se realiĝus mia propono, ni varbus multajn novajn lernantojn ne, kiel nuntempe ofte okazas, pro nuraj idealismaj celoj, sed pro la fakto, ke Esperanto rekte utilis al ili rilate al iu speciala intereso. Multaj el la ĝisnunaj komencantoj forfalas de la movado antaŭ ol iam aŭdi pri fakaj organizaĵoj.

Raif Markarian

Chorley, Britujo, 28 aŭg 67

### POSTKONGRESAJ ARANĜOJ 1967

Malgraŭ (aŭ eble pro) la fakto, ke nur kelkaj dekoj da kongresanoj ĉi-jare aliĝis al la postkongresaj aranĝoj en Nederlando, ĉiuj partoprenantoj estis tre kontentaj pri siaj spertoj. Temis pri septaga aŭtobusa ekskurso tra la tuta lando (aliĝis 35 personoj) kaj 4-taga restado en orienta Nederlando (aliĝis 25). Ambaŭ aranĝojn organizis rekte la C.O. de UEA, same kiel la Universalan Kongreson en Rotterdam. Gvidis respektive f-ino Helmi Veldhuizen kaj s-ino G. H. Drost-Jansen. Bona vetero ne malmulte kontribuis al la ĝenerala sukceso.

Pri la turismaj programoj jam anticipe informis sufiĉe detale la juli-aŭgusta "Esperanto". Ni menciis krome kelkajn pliajn vidiĵojn: la tradician flagsvingadon en Eindhoven, la frisajn popoldancojn en kostumoj el ĉ. 1870 en Leeuwarden, la Zamenhof-monumentojn en Utrecht kaj Leeuwarden (ĉio dum la 7-taga ekskurso) kaj la subĉielan muzeon de Arnhem (4-taga restado).

Sendepende de la supre priskribitaj aranĝoj, la aŭtobusaj karavanoj itala kaj jugoslava faris unutagan postkongresan ekskurson al Bruselo, kie, interalie, akceptis ilin en sia privata hejmo la aŭstralia ambasadoro, s-ro Ralph Harry, per parolado, regalaĵoj kaj prezento de filmo pri Aŭstralio.



Ciujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-PARIS 16, Francujo. En la tabelo ĥoroj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Por aliaj horsistemoj vidu la jarlibron 1967, 1-a parto, pp. 130-131. Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.



|                 |             |                                                                                                                                                                                                                       |
|-----------------|-------------|-----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|
| <b>Ciutage</b>  | 15.30-16.00 | Warszawa, 42.11 m ((7125 kcs), 41.99 m (7145 kcs), 31.50 m (9525 kcs), 31.45 m (9540 kcs), 31.01 m (9675 kcs), 25.34 m (11840 kcs). P. Pola Radio, Esperantaj disaŭdigoj, Warszawa, Pollando.                         |
|                 | 19.30-19.45 | Budapest, 240 m (1250 kcs), 75.10 m (3995 kcs), 48.10 m (6234 kcs), 30.50 m (9833 kcs), 25.20 m (11910 kcs), 16.80 m (17890 kcs), 13.80 m (21685 kcs). Radio Budapest, Esperanto-dissendoj, Budapest VIII, Hungarujo. |
| <b>Dimanĉo</b>  | 11.00-11.30 | Pekino, 47 m, 40 m. I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Ĉinujo.                                                                                                                                                  |
|                 | 12.30-13.00 | Pekino, 25 m, 19 m. I.                                                                                                                                                                                                |
|                 | 12.30-13.00 | Sorocaba, 278 m (1080 kcs). I.K. Radio Clube de Sorocaba (São Paulo), Brazilo.                                                                                                                                        |
|                 | 20.00-20.20 | Roma, 41.24 m (7270 kcs), 30.90 m (9710 kcs), 25.42 m (11800 kcs). P. Radio Roma. Esperantofako, Casella postale 320, Roma, Italujo.                                                                                  |
|                 | 20.05-20.30 | Sofia, 50.62 m (5920 kcs). P. Radio Sofia, Bulgarujo.                                                                                                                                                                 |
|                 | 21.30-21.45 | Teresina, 210 m (1430 kcs), 88.63 m (3385 kcs). I. P. Radio Clube de Teresina, Rua Barroso 175, Teresina (Piauí), Brazilo.                                                                                            |
|                 | 23.30-23.55 | Sofia, 49.42 m (6070 kcs), 31.38 m (9560 kcs). P.                                                                                                                                                                     |
| <b>Lundo</b>    | 00.15-00.45 | Muritiba, 216 m (1390 kcs), I.K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.                                                                                                                                        |
|                 | 12.05-12.10 | Bern, 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 19.60 m (15305 kcs), 13.94 m (21520 kcs). P. (D-ro A. Baur). Svisa Radio, S.O.C. Bern-16, Svislando.                                                                    |
|                 | 22.45-23.00 | Valencia, 278 m (1079 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.                                                                                                                                                |
| <b>Merkredo</b> | 6.45- 6.55  | Gdańsk, 230 m (1304 kcs). I. Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdańsk, Poll.                                                                                                                                                |
|                 | 12.05-12.10 | Bern, kiel lunde. (S-ro C. Gacond).                                                                                                                                                                                   |
|                 | 18.45-19.00 | Resende, 196 m (1530 kcs). P. Radio Agulhas Negras ZYP 22, Praça Oliveira Botelho, Resende (Rio de Janeiro), Brazilo.                                                                                                 |
|                 | 23.30-23.55 | Bilbao, 212 m (1412 kcs). I. P. Radio Bilbao, Apartado 1117, Hisp.                                                                                                                                                    |
| <b>Ĵaŭdo</b>    | 21.50-21.55 | Bern, 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs) 25.25 m (11880 kcs), 19.60 m (15305 kcs). P. (D-ro Baur).                                                                                                                |
|                 | 23.05-23.20 | Zagreb, 264 m (1133 kcs). P. Radio Zagreb, Jugoslavujo.                                                                                                                                                               |
|                 | 23.05-23.20 | Beograd, 439 m (683 kcs), 48.78 m (6150 kcs). P. (programo de Zagreb).                                                                                                                                                |
| <b>Vendredo</b> | 14.30-14.40 | Wien, 203 m (1475 kcs), 97.9 Mcs (MF). P. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.                                                                                                                         |
|                 | 20.00-20.30 | Pekino, 45 m, 42 m, 39 m, 38 m, 32 m. I.                                                                                                                                                                              |
| <b>Sabato</b>   | 11.00-11.30 | Pekino, kiel dimanĉe.                                                                                                                                                                                                 |
|                 | 12.30-13.00 | Pekino, kiel dimanĉe.                                                                                                                                                                                                 |
|                 | 20.00-20.30 | Pekino. Kiel vendrede.                                                                                                                                                                                                |
|                 | 21.50-21.55 | Bern. Kiel ĵaŭde (S-ro Gacond).                                                                                                                                                                                       |
|                 | 22.00-22.30 | Uberlândia 191 m (1570 kcs), I.K. Rádio Cultura de Uberlândia, Minas Gerais, Brazilo.                                                                                                                                 |

NOTO: La stacioj Warszawa, Pekino, Bern, Roma regule sendas senpagan programon de siaj elsendoj al petantoj.

RADIO ROMA. Vidu detalan programon en la septembra numero.

## NEKROLOGOJ

### BODIL NEERGAARD

La 8-an de aŭgusto en Kopenhago subite forpasis pro korkolapso s-ino Bodil Neergaard, edzino de d-ro Paul Neergaard. Ankaŭ s-ino Neergaard parolis Esperanton.

### MARIA MUDRAK

Pro trafik-akcidento en Innsbruck, kien ŝi venis pro la Eŭropa Esperanto-Kongreso, mortis la 26-an de julio s-ino Maria Mudrak, 73-jara edzino de s-ro Walter Mudrak.

### S-INO R. H. M. MARKARIAN

Nelonge antaŭ la 52-a Universala Kongreso

forpasis en Chorley, Britujo, la edzino de s-ro Raif Markarian. Kiel la edzo, ŝi estis instruistino. Ilia filino lernis denaske Esperanton. Al la funebrantaj familianoj ni esprimas sinceran kondolencon.


## MEMORE AL LA MURDITAJ FAMILIANOJ DE ZAMENHOF

Antaŭ proksimume 25 jaroj mortis en la nazia ekstermejo Treblinka, en Pollando, Ida Zimmerman, fratino de L. L. Zamenhof, kaj liaj filinoj Sofia kaj Lidja Zamenhof. La precizaj datoj de iliaj mortoj ne estas konataj.

nekrologoj

esperanto  
oktobro 1967





## LA JUNA VIVO

**Oficiala organo de  
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo.  
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al  
H. Bakker, Kastelenstraat 231,  
Amsterdam Z, Nederlando**

### LA INTERNACIA JUNULARA KONGRESO EN NATANJA

Kiom da preparoj, zorgoj kaj ĝojoj antaŭas Esperanto-Kongreson, povas nur plene kompreni tiuj, kiuj iam mem organizis kongreson. Kaj eble nur ili komprenas, kiel la organizantoj sentas sin, se subite, pro premo de la cirkonstancoj, la laboro montriĝis vana kaj la kongreso estas nuligita de la centra instanco. Tiel okazis pri la TEJO-kongreso en Natanja. Ili ne rezignis. Reŝanĝi la kongreslokon al Natanja ne plu eblis, sed povis okazi kongreso kaj en Rotterdam, kaj en Natanja. TEJO rekonis la kongreson en Natanja oficiale, kaj sendis el Rotterdam tripersonan delegitaron, konsistantan el svedino, kanadanino kaj nederlandano, sub gvido de estrarano de TEJO. Tiel inaŭguriĝis, la 10-an de aŭgusto, internacia junulara kongreso en la akcepta domo de Natanja. La urbestro, kiel ĉefa protektanto, bonvenigis; parolis aliaj, kaj ĉiuj sentis, ke ĉi tiu modesta kongreso signifas pli, ol kredigus ĝia amplekso.

Natanja vere dorlotis la partoprenantojn. On-doĵ kaj sablo, suno kaj floroj estis la ĉefaj dekoraj de la kongreso. Dume interŝoviĝis programeroj: vizitoj al Ulpan (lingvolernejo), al diamantprilaborejo, inaŭguro de Zamenhof-strato fare de la urbestro, oratora konkurso (unua premio: la ĵusaperinta libro "Freŝa mateno", rava israela rakonto), tutlanda kunsido, prelego pri la lando, eĉ postkongresa ekskurso por la eksterlandanoj, tra Tel Aviv! Kaj neforgesebla kulmino certe estis la 15-hora ekskurso en Galileon, tuŝanta amason da intereseĝaj lokoj. Abundegis turistoj, multe pli ol kutime. Ĉiutage okazadis ekskursoj al Jeruzalemo, al Sinai kaj ĝis la rivero Jarden. Se la estonteco de Esperanto inter la israela junularo dependos de same grandega, obstina kaj sindona laboro kiel okazis por la kongreso, ni esperas optimisme.

### JEFO-KONGRESO EN GRESILLON

Por la unua fojo okazis grava junulara renkontiĝo de JEFO en la fama kastelo Grésillon. Du ĉefaj temoj estis: 'kiel instrui Esperanton en la someraj kursoj de La Muelejo de la Metilernantoj', kaj: ĝenerala kunsido de JEFO kun estrarelektoj.

Pri la unua temo J. P. Boulet kaj s-ro Stuit donis ekzemplojn pri instruado kaj pedagogiaj ludoj. Kelkaj partoprenantoj provinstruis, kaj poste oni diskutis iliajn provojn. S-ro Gimbert, instruinto en la muelejoj, prelegis pri siaj spertoj.

Alian prelegon: pri rilatoj inter Unesko kaj UEA, faris s-ro Thierry. Entute la kongreso estis tre sukcesa, i.a. dank'al la organiza laboro de Louis Courtois kaj la estroj de la kastelo.

(rap.: Cl. Trésorier)

### ESPERANTO EN MEDIO DE STUDENTOJ

En novembro 1966 aperis en ITD, la plej populara semajnevuo por polaj studentoj, artikolserio pri Esp. de Roman Dobrzynski. Post tio ITD komencis kurson por studentoj. Krome la redakcio volonte kaj senpage publikigos korespondpetojn. Ĉiu, kiu interesiĝas, skribu al: Redakcio ITD, str. Ordynacka 9, Varsovio, Pollando, informante pri adreso, aĝo, ŝatokupoj, ktp. Oni ankaŭ povas simple sendi gratulleteron, tiel kontribuante al la nova kampanjo de PEA: Esperanto en la medio de studentoj.

(inf.: A. Pettyn)

### GRATULOJN ni prezentas al:

Marie-Claude Turin kaj Remy Gillet,  
Stanka Ŝtiglic kaj Svobodan Zlatnar,  
Eliza Weide kaj Torben Kehlet,  
pro geedziĝo.

Al Hans Michael Maitzen pro doktoriĝo,  
kaj al Anita kaj Adriaan den Haan pro naskiĝo de filo Remco.

### LA KURSOJ ĈE LE MOULIN DES APPRENTIS

okazis ĉi-jare de 15 julio ĝis 15 septembro, en la muelejo de Piot. Instruis du francinoj, anglo, bulgaro, germano, franco kaj nederlandano dum kvar dusemajnaj periodoj.



*Volontuloj-kursanoj riparas ŝtuparon en la muelejo de Piot. Ili eklernis Esperanton por interkomuniki dum la laboro.*

En 1965 mortis en Queensland (Aŭstralio) s-ro Arthur Maurice Hyde. En sia testamento s-ro Hyde destinis, ke 6/40 de lia havaĵo venu al Universala Esperanto-Asocio. La aranĝo de la aferoj daŭris ĝis antaŭ nelonge, sed nun la divido de la havaĵo povis okazi. Montriĝis, ke la parto por UEA estas 2151.07.11 britaj pundoj (proks. 21 500,— guldanoj).

Tiel s-ro Hyde, post sia morto, per sia mono ebligas al UEA daŭrigi kaj intensigi la laboron por la disvastigo de la Internacia Lingvo Esperanto. La listo de ricevitaĵoj heredaĵoj en la Ora Libro de UEA komenciĝas per la nomo de Hector Hodler, la fondinto de UEA. Al tiu listo nun estos aldonita la nomo de s-ro Arthur Maurice Hyde. Tiu listo ankaŭ klare montras, kiel la financa helpo al UEA en formo de gravaj donacoj kaj heredaĵoj venas el ĉiuj mondpartoj, same kiel el ĉiuj mondpartoj venis mono por la Ĉambroj de UEA.

E. J. Woessink  
Estrarano pri financoj

**NOVA SERVO DE UEA**

La Estraro de UEA komisiis la gvidadon de la nova Diapozitiva kaj Fota Servo al: s-ro H. J. Melasniemi, Turku 6, Itäinent. 40 D 65, Finnlando. La interesigantoj turnu sin rekte al s-ro Melasniemi.

**BELARTAJ KONKURSOJ 1968**

UEA denove invitas ĉiujn siajn membrojn kaj membrojn de la 53-a Universala Kongreso partopreni la Belartajn Konkursojn. La kompleta, reviziita regularo de la Konkursoj aperis en la Jarlibro 1965/I, p. 132-4. Nepre ĉiuj konkursantoj atente tralegu la regularon, precipe la artikolojn 1 kaj 2.

Kiel en la lastaj jaroj, la ĉijaraj branĉoj estas jenaj: 1. Originala poezio; 2. Tradukita poezio; 3. Originala prozo; 4. Originala drameto (por scenejo aŭ por radio).

Ĉiujn konkursaĵojn kun la aldonaĵoj laŭ la regularo oni sendu al la Sekretariino de la Belartaj Konkursoj: s-ino E. Lapenna, Nova Ves 32, ZAGREB, Jugoslavio. La limdato por ricevo de la konkursaĵoj estas la 31-a de marto 1968.

La valoroj de la premioj estas difinitaj jene: por 1-a premio, 100 gld.; por 2-a premio, 70 gld.; por 3-a premio, 40 gld.; por la premio "Nova Talento", 70 gld. Krome, la nomo de la "Nova Talento" estos engravurita sur la pokalo Henry Harabagiu.

Oni aparte petas, ke konkursantoj, kiuj tradukas verkojn de nemulte konataj aŭtoroj, aldonu al la konkursa traduko koncizajn biografiajn-kritikajn notojn pri la aŭtoro. Tiujn notojn oni poste utiligos okaze de eventuala publikigo de la traduko.

**Aŭstralio**

**Canberra.** D: la FD (Komerco).

**Aŭstrujo**

**Knittelfeld.** VD: Karl Vavra, fervojisto, A-8720 St. Margarethen /bei Knittelfeld, Siedlung 43.

**Belgujo**

**Antwerpen.** FD (Fervojo): C. S. Meeus, tekn. ing., Groenstr. 75.

**Brazilo**

**Ribeirão Preto** (São Paulo) 150 000. D & FD (Heraldiko: ekslibriso), (Ĵurnalismo) & (Turismo): José Pedro Miranda, ĵurnalisto, Rua Washington Luis 311, Caixa Postal 531.

**Tupi Paulista** (São Paulo) 19 000. D: Germano Braga, bankoficisto, Banco do Brasil S.A., C. Postal 44; tel. 122.

**Britujo**

**Norwich.** VD: Esther Watson, sekretariino, 5 Rolleston Close, Norwich, Norfolk NOR6OH; tel. 51914.

**Bulgarujo**

**Sofia.** FD (Muziko: komponado): Dimităr Terziev, gimnazia instruisto, Milin kamak 58, Sofia 21; tel. 66-52-56.

**Ĉeĥoslovakujo**

**Praha.** FD (Komerco: ekster- kaj enlanda): Jaroslava Mičová, ekonomino, Praha 6 — Petřiny, Krásného 8; tel. 354208.

**Francujo**

**F-14-Caen** (Calvados) 120 000. Jean Duthilleul, advokato, 120 Boulevard du Maréchal Leclerc. FD (Juro) & (Ŝako): la D.

**Germanujo**

**Würzburg.** JD: Michael Paul Zeilinger, instruisto, Am dicken Turm 4/I.

**Hispanujo**

**Barcelona.** FD (Juro): Rómulo Rocamora, advokato, Str. Rosellón 341; tel. 257-03-05.

FD (Polico): Manuel López Rodríguez, pensiulo, Plaza Prim No. 1-1º -3a, Barcelona-5 (kvartalo Pueblo Nuevo); tel. 225-50-24.

**Nov-Zelando**

**Christchurch.** FD (Bibliotekoj): Erin Frances McGifford, bibliotekisto, 26 Hart Street, Christchurch 2; tel. 64 612.

**Hamilton.** FD (Kemio): William F. Rolt, agrikultura kemiisto, 1 Brennan Place; tel. 65-786.

**Svislando**

**Biel-Bienne.** D: Willy Voirol-Reichen, librotenisto, Redernweg 21; tel. (032) 4 25 60.

**Usono**

**Houston.** D & FD (Religio: katolikismo ortodoksa) & (Tatuado): Edward F. Lacy III, verkisto, P.O.Box 1873, Houston, Texas 77001; tel. (713) 748-6139.

**NE PLU VALIDAS**

**Belgujo.** Edegem: FD.

**Finnlando.** Helsingin mlk: FD.

**Francujo.** Briançon.

**Kongo.** Kinshasa: FD (Instruado).

**Svislando.** Aarwangen. Leysin.

**Usono.** Hollywood.



Waal, f-ino A. W. van der, Amsterdam, Ned.

**DONACOJ POR ĜENERALA KASO (Gld.)**

Danlando: Zacho, s-ro P., 50,—. Nederlando: Fondaĵo Levi Lassen, 500,—; Postma, f-ino T., 100,—.

**POR VASTIGO DE LA AGADO (JARO DE INTERNACIA KUNLABORO, JARO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO)**

Britujo: Rytjkov, s-ro N., 50,— gld.  
Sumo entute ricevita: 26 092,32 gld.  
Sumo elspezita: 25 851,54 gld.  
Saldo pozitiva: 240,78 gld.

**DONACOJ POR LA 52A UNIV. KONGRESO**

Britujo: Bing, s-ro H., 10,—; Rytjkov, s-ro N., 50,—. Francujo: Jullien, s-ro M., 100,—. Mek-siko: Zepeda, f-ino Alicia, 286,50. Nederlando: Blokpoel, s-ro H. J., 100,— gld.

**DONACOJ POR INTERNACIA ARTA TEATRO**

Nederlando: Werff, ges-roj v. d., 10,— gld.  
Usono: Helmuth, ges-roj F., 15,— gld.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,  
Direktorino C.O.

**LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1967**

stato je la 31-a de aŭgusto 1967

**Konkurso I**

| Lando              | Kvoto | Poentoj | %     |
|--------------------|-------|---------|-------|
| 1 (2) Belgujo      | 2055  | 1740    | 84,67 |
| 2 (3) Nederlando   | 5975  | 5056    | 84,62 |
| 3 (1) Francujo     | 7752  | 6551    | 84,51 |
| 4 (6) Germanujo    | 7221  | 5925    | 82,05 |
| 5 (4) Britujo      | 6691  | 5403    | 80,75 |
| 6 (5) Usono        | 4526  | 3615    | 79,87 |
| 7 Hispanujo        | 3250  | 2440    | 75,08 |
| 8 Finnlando        | 3160  | 2285    | 72,31 |
| 9 Svedujo          | 7180  | 5160    | 71,87 |
| 10 Svislando       | 2459  | 1645    | 66,90 |
| 11 (15) Jugoslavio | 5375  | 3330    | 61,95 |
| 12 (11) Italujo    | 4220  | 2610    | 61,85 |
| 13 (12) Danlando   | 3099  | 1775    | 57,28 |
| 14 (13) Brazilo    | 3856  | 2173    | 56,35 |
| 15 (14) Japanujo   | 3965  | 2070    | 52,21 |

**Konkurso II**

|                     |      |      |        |
|---------------------|------|------|--------|
| 1 Kanado            | 1124 | 1240 | 110,32 |
| 2 Islando           | 250  | 240  | 96,00  |
| 3 Aŭstrujo          | 1475 | 1245 | 84,41  |
| 4 Aŭstralio         | 1475 | 1219 | 82,64  |
| 5 (6) Sudafriko     | 260  | 200  | 76,92  |
| 6 (5) Nov-Zelando   | 1481 | 1128 | 76,16  |
| 7 Israelo           | 595  | 365  | 61,34  |
| 8 Grekujo           | 270  | 165  | 61,11  |
| 9 Norvegujo         | 1755 | 1060 | 60,40  |
| 10 (11) Argentino   | 905  | 540  | 59,67  |
| 11 (10) Madagaskaro | 250  | 143  | 57,20  |

(Vidu la regulojn sur paĝo 33. Interkrampaj ciferoj indikas pasintmonatajn poziciojn.)

**Informoj** pri la nunaj eblaj aperoj de la Virgulino en Garabandal. Skribu Esperante kun unu respondkuponon: S-ro Soulet, 20 rue Bernardin, F-36-Châteauroux, Francujo.

**António Cadima**, Vila Nova, Angola, Afriko Okcidenta Portugala. Deziras korespondi kun tuta mondo pri ĉiuj temoj kaj filatelo. Sendu poŝtmarkojn, mi sendas saman kvanton. Certe mi respondos.

**Helpu** la junul-movadon brazilan! Sendu librojn nebezonatajn al: Francisco Stefano Wechsler, Caixa Postal 18, ZC-00, Rio de Janeiro, Brazilo.

**En Sovetunio** fondiĝis Koresponda Servo de junaj sovetaj esperantistoj. Kiuj deziras trovi junajn korespondamikojn en Sovetunio bonvolu sin turni al estro de KS: Kazancev Leo, p.k. 10, IVANOVO-centr, USSR. Al la sama adreso oni sin turnu en okazo de eblaj nere-spondoj.

**Mi deziras kontakti kun kemiistoj** de organika kemio kun celo helpi nin reciproke per Esperanto en scienca informado kaj esperantigo el nacia lingvo de necesaj sciencaj artikoloj. Skribu al: Gončarov Anatolo, p.k. 11, BARNAUL-99, USSR.

**Deziras korespondi** kun esperantistoj el tutmondo por diversaj temoj de interŝanĝo. Adreso: Trifoi Constantin, Str. Stelei Nr. 4/a, Baia-Mare, Rumanujo.

**Por sukcesi** kaj feliĉadi jen via gvidilo: "Monoteismo kaj Pozitiva Moralo" de Emil Gasse. Mendu al UEA aŭ ceteraj Libroservoj. Gld. 4,20; st. 16,80 + 10%.

**Lernejoj!** Partoprenu kun viaj klasoj en la lernigaj rondoj "Graĵoj en Vento". Unikaj en la mondo! Graĵoj en Vento, rue des Pins 66, CH-2500 Bienne-Biel 7, Svislando.

**Se vi serĉas seriozajn** gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, F-63-Clermont-Fd., Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

**Universala Revuo** (Legajoj por ĉiuj) entenas la Adresaron "Esperanto-Parolata", plej utila por parole uzi la interlingvon (Jarlibro, paĝo 126).

**Ĉarma hungara f-ino** 37-j., blondhara, alta kaj inteligenta, volas edziniĝi al serioza esperantista viro, kiu havas interesiĝon por muziko, literaturo kaj la naturo. Leterojn al: F-ino Martha Mózes, Budapest 4, Poste Restante.

**Ĉu vi estas ĝuste informita** pri la katolika eklezio kaj ĝia tutmonda agado? Abonu la organon de I.K.U.E., ESPERO KATOLIKA. Jarkotizo svisaj fr. 13.— Mendebla ĉe: Centra Oficejo de IKUE, Ch-9106 Zürchersmühle, Svislando.

**Religia kaj katolika literaturo** estas mendebla ĉe la eldonejo EKUMENA ESPERANTO, Ch-9106 Zürchersmühle, Svislando. Petu libro-

MENDU LA BINDITAJN KOLEKTOJN DE

## MONDA KULTURO

Bela kaj fortika, dukolora bindo kun ora surpreso. Poezio, noveloj, priartaj artikoloj, ĉiam legindaj. Tre konvenaj kiel donacoj, ĉu unuope, ĉu kune.

Vol. 1 (1962-64), 288 + 36 p., 27 × 19 cm.

Vol. 2 (1965-66), 168 + 24 p., 30 × 21 cm.

Prezoj: ĉiu volumo po 19,— gld.  
plus sendokostoj 10%

## BINDITA JARKOLEKTO

de la revuo "Esperanto", 1966:

204 + 44 paĝoj, 136 ilustraĵoj.

Bela volumo bindita en verda tolo kun ora surpreso.

Por Membroj-Abonantoj 1966: 7,— gld.

Por aliaj mendantoj: 14,— gld.

## GEPATRA BULTENO

sub aŭspicio de UEA

Forumo kaj helpilo por gepatroj, kiuj instruas Esperanton al siaj infanoj. Subtenu ankaŭ vi ilian gravegan agadon per via abono! Aperas kvaronjare, bele multobligita kaj ilustrita.

Redaktas Derrick P. Faux. Jarabono: 3,50 gld.  
(7 ŝil., 14 st.). Peranto: UEA.

### "YES, ESPERANTO IS THE ANSWER TO THE WORLD LANGUAGE PROBLEM"

de Ivo Lapenna

kaj

### "REMARKS ON THE ESPERANTO SYMPOSIUM"

de Mario Pei

Tiuj ĉi gravaj studoj pri la lingva problemo kaj ĝia solvo aperis presite en la angla lingvo kiel 16-paĝa CED-dokumento Doc. A/IV/4-6. Kune ili formis konvinkan informilon bone uzeblan ekz. inter studentoj k.s. medioj. Mendu ĉe la Libroservo de UEA: 1,— gld.

## DU OFICIST(IN)OJ SERĈATAJ POR LA CENTRA OFICEJO DE U.E.A.

bone regantaj Esperanton parole kaj skribe.

Unu kun fakaj scioj kaj kvalifiko pri librotenado, kapabla memstare gvidi tiun fakon;

dua por redaktado de la jarlibro kaj por diversaj aliaj oficejaj laboroj.

Leteroj kun informoj pri instruiteco, diplomoj, antaŭaj oficoj, aĝo, rekomendoj ktp. al la Direktorino de la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam.

MENDU ĈE U.E.A.

la broŝuron

## LA ESPERANTO-SOCIETO

Elstaraj artikoloj de la estraranoj de UEA:

Ivo Lapenna

Günther Becker

E. L. M. Wensing

Maurice Jaumotte

represitaj el "Esperanto".

Abundaj konsiloj por ĉiuj grupaktivuloj — pri informado, organizado, instruado kaj distraĵoj.

Kun aldono de modela statuto de loka grupo.

20 p., 22 x 17 cm.

Prezo: 1,50 gld. (6 st.)



## KIAL NE ?

La Inteligenta Esperanto-Gazeto  
por modernaj gejunuloj.

LEGINDA  
PENSIGA  
SATIREMA

Unuvorte — la sola gazeto  
por raciaj homoj.  
Jarkotizo = 20 steloj/10 ŝilingoj.

'Kial Ne ?'  
2, Edwina Gardens,  
Redbridge, Ilford,  
Essex, Anglujo.

## IMPERATIVOJ DE LA VIVO

de

H. Rohden

Kristana orientigo por la ĉiutaga vivo.

La aŭtoro parolas al la tuta kristanaro pri la  
regno de la ĉielo.

Libro nepre legenda de ĉiu esperantisto.

Prezo unu dolaro aŭ egalvaloro.

Mendebila ĉe la Libro-Servo de U.E.A. aŭ

**LIVRARIA SABEDORIA**

**Rua Senador Dantas, 117-E**

**Rio de Janeiro - Brazilo**



## LA UNUA NATURSCIENCA REVUO EN LA INTERNACIA LINGVO

Abono per UEA:

5,40 gld. aŭ  
jare (3 n-roj)


1,50 us. dol.

Okaze de la 150-a datreveno de la naskiĝo de  
Miĥail Lermontov, la granda majstro de la  
rusa prozo, UEA eldonis ĉi tiujn elstarajn  
rakontojn en la traduko de D. Staritsky.

Kun bibliografio  
de Lermontovaj  
verkoj en  
Esperanto

Moderna plasta  
kovrilo

Prezo: 5,- gld.  
(20 steloj)



Per plumo samtempe ekscita, kortuŝa, ironia  
kaj senspirige poezia, la aŭtoro vojaĝigas nin  
kun juna rusa oficiro, laca pri la vivo kaj  
kroĉiganta al la iluzia feliĉo de fortaj sensaĵoj.

## LINGVOLOGIA REVUO

Esperantlingva fakeldonaĵo por lingvologio, la  
ekzakta lingvoscienco kalkuleca. La kvara  
numero aperis. Specimenoj haveblaj senpage  
malal la eldonanto kaj redaktoro Emil Han-  
hiniemi, P.O. Box 764, Ingham, 4850-N-Queens-  
land, Aŭstralio.

Lingvologio - la nova lingvoscienco ekzakta.

## ĴUS APERIS NOVA ELDONO

de la plej vaste uzebla anglalingva  
dokumento de CED:

**"Basic Facts about the International Language  
Esperanto" (Doc. RDC/7)**

Tute reviziita kaj ĝisdatigita teksto.  
Prezo: 0,50 gld.

Mendu ĉe la Libroservo de UEA